

ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio).
W. M. Page, adv., Edinburĝo.
E. Archdeacon, Paris.
Joan Gili Norta, Barcelona.
Teo Jung, Köln (Kolono).
G. van Heek, Hengelo.
Frans Schoofs, Antwerpen.
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno).
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Butin.
Literatura redaktoro: Zanon.

ESPERANTO

★ TRIUMFANTA ★

ADMINISTREJO:
Köln-Horrem, Rejnlando, Germanio.
Poŝtĉeka konto Köln 70868, por Teo Jung, Köln-Horrem.
Manuskriptojn oni skribu nur sur unu flanko de la papero. Skribu ĉion legeble, se eble per maŝino. Por sendado aŭ respondo aldonu resp.-kup. aŭ poŝtk. Adresu ĉion al a-o Teo Jung, Köln-Horrem, Germanio.

ABONEJOJ
ekzistas en multaj landoj. Vidu la liston de la Abonejoj sur la anonca paĝo. — En multaj lokoj ET estas poekzemplere aĉetebla ĉe stacidomoj kaj aliaj publikaj gazet- kaj libro-vendejoj kaj en grupoj. Dum vojaĝo oni postulu ET en ĉiu stacidoma gazet-vendejo, hotelo, kafejo kaj restoracio.
Komercaj ĉambroj favoraj al Esperanto abonas ET senpage ĉe la administrado per oficiala letero. — Bibliotekoj, legejoj, redakcioj, aŭtoritataj (ne-Esperantistaj) povas ricevi ET pro propagandaj celoj por la duono de la abonprezo.

Aperas semajne.
3 dolaroj, 7.50 guldenoj, 12 svedaj kronoj, 15 ŝilingoj, 15 danaj aŭ norveĝaj kronoj, 15 pesetoj, 25 francaj aŭ belgaj frankoj, 35 liroj, 60 finnaj markoj, 75 ĉsl. kronoj, 360 hung. kronoj, 1800 aŭstr. kronoj, 1600 pol. markoj. — Ĉiu pagas en la valuto de sia propra lando per naĉaj bankbiletoj en rekomendita letero, aŭ per germanaj bankbiletoj aŭ ĉekoj sur germanaj bankoj laŭ la taga kurzo. — Balkanaj kaj baltaj ŝtatoj pagu duonjare 50 gmk., Rusio 40 gmk. Aliaj landoj pagu per dolaroj aŭ ŝilingoj, aŭ 100 respond-kuponoj aŭ 400 germanaj markoj. — Ne estas necese pagi tutan jarabonon je unu fojo. Oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. Abonantoj, kies abono estas finiĝonta, ricevas ĝustatempe admonilon. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero. — Germanoj abonu ĉe la poŝto (Postzeitungsliste, 13. Nachtrag, Ergänzungsheft 3, paĝo 280, sub „Kunstsprachen“), kvaronjare 25.25 mk., aŭ rekte ĉe la administrado Köln Horrem, Germanio (ĉiu numero banderolita 2,— mk.).

JARABONO:
Aperas semajne.
kostas po cm² (kvadracmetro) por ĉiuj landoj 3 gmk., ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj granda rabato. — ANONCOJ kostas po 2 foja enpresoj kaj po 28 vortoj por bonvalutaj landoj (ankaŭ Italio kaj Finnlando) la prezo de 4 n-oj de ET (1/12 jar-abono aŭ 4 stampitaj respond-kuponoj); por malbonvalutaj landoj la prezo de 6 n-oj de ET (1/6 jar-abono); 1 foja enpresoj kostas la saman kiel 2 foja; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncoj de la abonkonto. — Familiaj anoncoj (naskiĝo, fianĉiĝo ktp.) kaj anoncoj pri gravaj esp. okazintaĵoj (ĉefkunado, fondiĝfesto ktp.) estas unufoje enpresataj senpage.

ANONCOJ
kostas po cm² (kvadracmetro) por ĉiuj landoj 3 gmk., ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj granda rabato. — ANONCOJ kostas po 2 foja enpresoj kaj po 28 vortoj por bonvalutaj landoj (ankaŭ Italio kaj Finnlando) la prezo de 4 n-oj de ET (1/12 jar-abono aŭ 4 stampitaj respond-kuponoj); por malbonvalutaj landoj la prezo de 6 n-oj de ET (1/6 jar-abono); 1 foja enpresoj kostas la saman kiel 2 foja; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncoj de la abonkonto. — Familiaj anoncoj (naskiĝo, fianĉiĝo ktp.) kaj anoncoj pri gravaj esp. okazintaĵoj (ĉefkunado, fondiĝfesto ktp.) estas unufoje enpresataj senpage.

Numero 70 :-: Edinburĝo, Paris, Barcelona, Köln, Hengelo, Antwerpen, Warszawa, Kaunas :-: 5. Febr. 1922.


Ni preparu nin por Genève!

Apatio.
Esperanto staras sur la sojlo de sia plej granda venko aŭ malvenko.
La Ĝenerala Sekretario de la Ligo de Nacioj estas komisiita prepari plenan raporton pri la jam fariĝintaj spertoj kaj la rezultoj jam atingitaj rilate al la instruado de Esperanto en lernejoj.
Laŭ „Esperanto“ dufoje d-ro Privat dissendis demandan leteron al 22 naĉaj societoj pri ĉi tiu grava afero. Respondis unuan fojon kvin societoj, duan fojon sep.
Kiu estas la malamiko de Esperanto? Ĉu la Idistoj? Ĉu la ŝovinistaj nacilingvo-partianoj? Ne.
Ĉu oni skribos, ke Esperanto malvenkis pro la apatio de la Esperantistoj? Se vi... se vi faras nention, vi jam respondis la demandon. *W. M. P.*



La Sinkso en Egiptujo.

Bildoj pri la transmara reveno de ĉsl. legioj el Siberio.
La bildoj estas elĉerpitaj el la ĵus aperinta belega albumo „Transmara Reveno de ĉsl. Legioj el Siberio“, kiu estas ricevebla por 14 sv. frk., 140 kĉ. (por ĉeĥoslovakioj), 350 g. mk. (por germanoj) de Bohema Esperanto Servo (ing. C. Berger) en Moravany, Ĉeĥosl. La albumo (legu recenzon en ET n-o 69) en formato de ĉ. 34:24 cm enhavas 229 neopie presitajn reproduktajn el preskaŭ ĉiuj partoj de la tero: el Azio, Oceanio, Afriko, Ameriko k. Eŭropo.



En Bengala Golfo: Enterigo sur Maro.

La Gazetfonda Febro

dangera malsano disvastiĝanta en Esperantujo.

„Esperanto bezonas ne mil gazetojn kaj ĵurnalojn, sed milianojn!“
Mi ne scias, ĉu tiu frazo estu moko aŭ ĉu efektive ĝi respegulas la konvinkon de ĝia skribinto. Ĝin skribis eldononto de nova Esperanta revuo, kiu anoncis en ET sed kiun antaŭ publikigo de lia anonco mi avertis, ke la mono elspezo por la anonco estos forĵetita, same kiel estos forĵetita la mono elspezo por la eldonado de la revuo mem.
Certe, „profilojn mi neniam ne atendas, ĉar mi laboris, laboras kaj laboros nur por nia ideo!“ daŭrigas la sama eldononto. Tio sonas tre bele, se oni sin ne sentas ĝenata pro la duobla neo*) entenata de tiu ĉi frazo; sed ĝi estas nepripensitaĵo. Ankaŭ mi komencis la eldonadon de ET kun pure idealistaj intencoj. Mi estis preta oferi multon, eĉ ĉion, al mia idealo, la Lingvo

Internacia. Sed iom post iom mi konvinkiĝis, ke tia idealismo estas danĝera por la entreprenoj ĵus komencita de mi, ke agado laŭ ĝi estos, se ne malsana; sed certe ne saĝa. Mi konvinkiĝis, ke la entreprenoj devas esti starigita sur nepre firmaj komercan bazon; alie, kiam foje mi malsaniĝos aŭ eĉ mortos, ankaŭ mia entreprenoj malsaniĝos aŭ mortos, ĉar ne tuj troviĝos alia idealigisto por oferece daŭrigi ĝin, se ĝi ne garantios almenaŭ rekompencojn de la laboro farota por ĝi.
Bedaŭrinde la ĉi-supre aludita eldononto ne estas la sola, kiu havas la intencojn eldoni „Internacian, ampleksan, riĉe kaj plej bele ilustritan“ revuon. Mi scias ankoraŭ kelkajn aliajn havantaj precize la saman intencojn, ne parolante pri la sennombraj efemeraj gazetetoj de niaj ligoj, grupoj, rondoj, ofte nur hektografitaj kaj parte nur eldonataj por interŝanĝe ricevi la kuitajn du ekzemplerojn de la aliaj Esp. gazetoj. Ilin ĉiujn atakis tiu sama malsano, kiun oni trafis nomis la „gazetfonda febro“

Antaŭ la milito ni jam spertis tiun malsanon; sed ŝajnas, ke nun ĝi revenis kun pli granda efiko. Kiel la „gripo“ ĝi invadis Esperantujojn, senkompatate malplenigante la jam ne tro plenajn kazojn de ligoj, grupoj kaj individuaj fondemuloj. Ĉu ne ekzistas rimedo kontraŭ tiu malsano? Certe jes.
Ĉiu, kiu ricevas prospekton aŭ specimenon aŭ kiu legas anoncon de tia nove fondota nebezona gazeto, ne atentu ĝin! Se ĉiuj solidare malakceptos, la eldonemo baldaŭ cedos al klara pripensado.
Jam unufoje ni spertis tion en 1921. Eldonisto dissendis specimenon numeron de nova revuo, la ŝamideojn solidare, kvankam tute silente, rifuzis la novan revuon, kaj — dua numero ĝis nun ne aperis.
Laŭ tio mi konkludas, ke la tutmonda Esperantistaro rifuzos ankaŭ la novajn revuojn eldonotajn en Berlino, en Vilno, en Budapeŝto, kiuj cetere ĉiuj havas preskaŭ la saman programon.

Por kontentigi sian idealismon, oni trovas sufiĉe da aliaj rimedoj ol la fondon de nova gazeto: kunagado modesta en grupo, malpli modesta en provinca ligo, en naĉa aŭ faka asocio, en UEA — kunlaborado ĉe ET, ĉe „Esperanto“ de UEA, ĉe naĉaj aŭ fakaj Esp. gazetoj —. Kaj se oni havas tro grandan kaj tro plenan monujon, oni ne bezonas forĵeti la superfluan monon per fondado de ne necesaj, morte naskataj entreprenoj, sed oni povas ĝin uzi pli utilige, subvenciante jam ekzistantajn gravajn entreprenojn. La kazo de UEA, de ĉiuj naĉaj kaj fakaj Esp. asocioj, de ĉiuj ligoj kaj grupoj ne rifuzos, se vi volos donaci al ili jen cent, jen mil markojn aŭ eĉ frankojn. La administracio de ET ankaŭ tute ne rifuzos, se vi sendos al ĝi sumon por lu difinita celo, ekzemple, por sendado de abonoj al malriĉaj rusaj ŝamideoj

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.
Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.
Tradukita laŭ la 5-a rusa eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Ŝidlovskaja.

(Ĝi-a daŭrigo kaj fino.)
Baldaŭ la historio de Mateo estis forgesita, kaj nek Dima, nek Anna ekscitis, ke li loĝas apud Debltown, poste en la hebrea kolonio, ke li fariĝis ŝtatano kaj eĉ voĉdonis post doloraj ŝanceliĝoj kaj duboj — li ne povis ne rememori la historion de Dima en Nov-Jorko. Iom post iom ŝanĝiĝis eĉ lia rigardo, la esprimo de lia vizaĝo, lia tuta figuro. En lia animo naskiĝis novaj pensoj pri homoj, pri socia ordo, pri religio, pri la vivo, pri Dio, kiun oni adoras kvankam en malsama maniero sur la tuta terglobo, pri multo alia, kio neniam venis en lian kapon en Loziŝko. Kelkaj el tiuj pensoj iĝis ĉiam pli klaraj, pli intimaj...
Dume Anna loĝis ankoraŭ en la domo 1235, sed la sinjorino fariĝis ĉiam pli kaj pli mal-kontenta je ŝi. Ŝi jam memvole du fojojn pli-grandigis ŝian salajron, eĉ „dankekon“ ŝi ne vidis. Male, la karaktero de Anna ĉiam pli kaj pli malboniĝis, aperis senkaŭza neŝato, manko de respekto.
„Kion fari? ... oni parolas la veron, ke ĉi tie ĝi estas en la aero“, diris la edzo de la maljuna sinjorino; sed la eltrovinto, kiu ĉiam ankoraŭ sidis super siaj desegnaĵoj, kaj al kiu la sinjorino sin turnadis lafoje kun plendoj, supozante, ke li povus influu je Anna, levedis nur la ŝultrojn.
„Mi nun estas malproksime de ĉio ĉi tio,“ li parolis, „sed jam unuverte, al mi ŝajnas, ke ŝi tute simple deziras havi sian propran vivon...“
„Jen kio?“ eksciis la sinjorino kun sincera miro. „Eble mi devas ankoraŭ krom la 10 dolaroj da salajro aranĝi al ŝi sian propran vivon?“

„Nu, tio nun min ne koncernas“, diris la maljuna sciencisto. „Ĉion ĉi tion solvos la scienco. Ĉio pri ŝi, kaj vi, kaj pri ĉiuj... Homo eltrovas maŝinon, kiun li bezonas, maŝino siavice eltrovas homon, kiun ĝi bezonas... La problemoj konsistas en tio, ke oni eltrovu tian universalan maŝinon, kiu bezonas nur liberan homon. Tiam, — vi ja komprenas — tiam estos solvitaj ĉiuj turmentaj demandoj... En tiu estonta socia ordo estos nek gemastroj, nek servistoj, nek sklavoj kun iliaj envio, nek sklavoposedantoj kun iliaj postuloj. Ĉu vi min komprenis?“
La maljuna sinjoro levis sian okulvitrojn sur la frunto kaj kun naive-ĝoja rigardo sin turnis al la sinjorino. Sed ŝia vizaĝo esprimis grandan indignon.
„Mi dankas!“ ŝi diris. „Bela estas via estonta socia ordo sen servistaro! Mi preferas la nunan ordon...“
Sed ŝiaj rilatoj kun Anna fariĝis ĉiam pli kaj pli malbonaj. — — —
Du jarojn post la komenco de nia rakonto alikreska blondulo kun barbo kaj bluaĵoj forlasis vagonon de la aera relvojo ĉe la angulo de la strato IV kaj sin direktis en unu el la transversaj stratoj, serĉante la domon n-ro 1235. Trovinte ĝin, li haltis sur la perono kaj ĉirkaŭrigardis en la strato. Ĉio restis sama kiel antaŭ du jaroj. Same la domoj kiel dunaskitaj infanoj similis unuj aliajn, same la suno lumigis la mallevitajn kurtenojn ĉe unu flanko, dum ĉe la alia la domoj restis en ombro.
Liaj okuloj emocije vidis ĉie postsignojn de la pasinteco. Jen malantaŭ la angulo ŝajne irakuris vira figuro! Jen tiu sama viro aperis el post la angulo, paŝante tiel peze, kvazaŭ peza ŝarĝo estus alligita al liaj piedoj, kaj la viro iras, sopire rigardante la nekonatajn domojn, similajn reciproke kiel du gutoj da akvo. — Ĉio estas la sama, — pensis Lozinski, — sed ne ekzistas plu la tiama homo, kiu vagadis tra ĉi tiu strato antaŭ du jaroj, ekzistas alia homo

La sonorilo ektintis, la pordo malfermiĝis, el post ĝi elrigardis la vizaĝo de Anna, kaj tuj la pordo ree brufermiĝis post la timigita ekkrio de la knabino, kiu kvazaŭ vidis fantomon. Poste ŝi ree elrigardis tra la fendo inter du pordopartoj kaj demandis:
„Ĉu vi, Mateo? Ĉu vere tio estas vi?“
La maljuna sinjorino ankaŭ kun granda miro renkontis la viron kaj kun peno rekonsis en li la simplanman Loziŝkanon en blanka kileto kaj dikaj botoj, kiu iam tiel humile aprobis ĉiujn ŝiajn opiniojn pri la amerika vivo kaj pri kelkaj sociaj principoj. Ŝi atente lin observadis tra siaj okulvitroj kaj sincere opiniis, ke li fariĝis malpli simpatia. Estas vero, li ne tenis sin tiel arogante kiel tiu juna John, sed li ne aperigis ankaŭ la tiaman afablan, honteman humilecon, kiu tiel agrable karesis la okulojn de la sinjorino. Krom tio ŝi trovis, ke la nigra surtuto ne pli bone taŭgas por li ol „selo por bovino“.
„Sidiĝu, mi petas,“ ŝi diris iom ironie. Ŝi tamen sentis, ke estus ne bone lasi stari la viron.
Ĝustadire, la sinjorino ne estis malbona kaj, kiam Anna sciigis al ŝi, ke ŝi forlasis la oficon, ŝi komprenis, ke nun Anna havas atentindan kaŭzon.
„Jen, ŝi trovis por si sian propran vivon“, ŝi diris iom maldolĉe al la maljuna sciencisto, kiam Anna estis forveturinta. „Nun ni vidu, kion vi diros: mi ne scias, kiam ankoraŭ aperos via estonta socia ordo, sed hodiaŭ ni havas nenion por ordigi la ĉambrojn...“
„Hm, jes!“ medite diris la sciencisto. „Mi devas konfesi, ke ĉi tiu havas en si ion malagrablan. Certe kun la tempo ĉio nepre estos aranĝata. Sed... efektive estos malfacile elpensi maŝinon, kiu farus ĉion same agrable kaj lerte kiel tiu aminda knabino.“
Dum kelkaj sekvintaj tagoj ankoraŭ la maljuna sciencisto sin sentis malbonhumora kaj diris, ke eĉ en lia kalkulado io lin malhelpas.

„Hm, hm! ... mi devas konfesi,“ diris ŝi al la maljuna sinjorino. „Al mi mankas ŝia vizaĝo kaj ŝiaj bonaj bluaĵoj okuloj... Sendube iom post iom ĉion tion anstataŭos maŝino.“
Sed li interrompis sian frazon sub la fiksa ironia rigardo de la sinjorino, kiu murmuris tra la dentoj:
„Ĉu la bluaĵoj okulojn? Dubeble...“
Antaŭ sia forveturo el Nov-Jorko Mateo kaj Anna iris al la bordo por vidi la alvenon de eŭropa ŝipego. En ilia alesto alvenis mara giganto, trancante per sia brustego la ondajn de la golfo; malgranda ŝipo aliris ĝin al la bordo kaj sur la albordigejon eliris de la ŝipo dekaj, centoj da homoj, kunportante sian malĝojon, sian esperon.
Mateo malĝoĝiĝis. Li rigardis malproksimen, kie post la malpeza blua nebulo ĉe la horizonto leviĝis oceanaj ondegoj, kaj lia penso kiel mevo flugis ankoraŭ pli malproksimen, flugis al lia malnova patrujo... Kaj li sentis, ke forta, brula sopiro premas lian koron.
Li nun komprenis la kialon: en li io nova naskiĝis, dum la malnova mortis aŭ estis ankoraŭ mortanta. Li nun kun doloro bedaŭris multon el tiu mortanta estinteco, kaj malgraŭvole li ekmemoris sian interparoladon kun Nilov kaj liajn demandojn. Mateo konsciis, ke jen — li jam posedas pecon da tero, domon, bovidojn, bovinojn... Baldaŭ li havos edzinon. Sed li forgesis ankoraŭ ion, kaj nun tiu forgesita „io“ ploras kaj sopras en lia animo.
Forveturi... tlen... returnen... kie restis lia patrujo, kie nun vivas Nilov kun sia eterna serĉemo... Ne, li ne faros tion: ĉio rompiĝis, multo jam mortis kaj ne reviviĝos plu en Loziŝko; en lia dometo loĝas fremdaj homoj; ĉi tie li havas infanojn, kaj la infanoj de liaj infanoj forgesos jam sian gepatran lingvon, kiel tiu virino en Debltown

solfontaj je Esp. legajo, por propagando de Esperanto per ET de komercaj ĉambroj, ĉe infuriantaj personoj al firmoj, por aranĝo de konkursoj ktp.

Do, oni tute ne zorgu, kiamaniere oni troa entuziasmo trovu elvaporigilon, kiamaniere oni krevonta monujo maldikiĝu; ekzistas tiom kaj tiom da agadkampoj kaj elspezobloj, ke necesas nur la bona volo por ekkoni ilin.

Kelkaj legantoj riproĉis al mi, ke entute mi publikigis anoncojn pri fondotaj Esp. gazetoj. Nu, tion mi faris, ĉar ET estas komerca entreprenado, do kiel komercisto, kiu per la pago ricevoita povas plifirmigi sian entreprenon; sed ne kiel Esperantisto, ĉar kiel tia mi tutekompreneble povas nur forte malaprobi la forĵeton de mono por ne vivebla entreprenado, kiu povus esti pli utilige uzata por jam ekzistantaj organizaĵoj, gazetoj ktp. Se mi ne akceptus la anoncojn, la fondemuloj jam trovus aliajn, kvankam malpli oportunajn kaj pli multekostajn vojojn por aliri siajn viktimojn.

Cetere, mi ne volas, ke oni diru pri ET, ke ĝi malakceptas iajn anoncojn aŭ artikolojn malagrablajn por ĝi mem. Mi ja havas — kiel redaktoro — ĉiam la eblon tuj kontraŭi ilin, se mi ilin opinias neutilaj aŭ eĉ malutilaj al nia movado. Pro tio ankaŭ mia hodiaŭa artikolo.

Do, kiu samopinias kun la jam kelkfoje menciita fondoto de nova revuo, ke — ĉe la nuna stato de nia movado — „Esperanto bezonas ne mil gazetojn kaj ĵurnalojn, sed milionojn“, tiu tuj kaj senhezite abonu la novan revuon; kiu opinias male, rifuzu ĝin! Ĉiu homo havas liberan volon. Agu laŭ ĝin!

T. J.

T. E. K. A.

Karaj Kunfratoj!

La Centra Komitato de TEKA transdonis al mi, kiel gvidanto de la Centra Oficejo de TEKA, la redakton de la I-a Komunikajo por ĉiuj kuracistoj-esperantistoj pri la nuna stato kaj evoluo de nia Asocio. Jen ĝi:

La TEKA, kies oficiala organo „Kuracisto“ ĉesis aperi en la momento de l' ekplodo de la mondmilito kaj kiu pro la sama kaŭzo ne funkciis de la jaro 1914, estas denove restarigita en Praha dum la XIII-a Tutmonda Esp. Kongreso en 1921.

Estas elektita nova C. Komitato (prez. prof. d-ro Vanverts-Lille, I-a vicprez. d-ro Bischiŝky-Praha, II-a vicprez. d-ro Briquet-Lille, kasistino d-ro Cass-Preston, sekr. d-ro Austerlitz-Bardiov), estas nomitaj Honoraj Prezidantoj prof. Richet kaj prof. Gariel-Paris, novaj Honoraj Membroj prof. Bujwid-Krakow, d-ro Mybs-Altona, d-ro Artigues-Paris kaj d-ro Filippetti-Milano; fine estas fondita Centra Oficejo de TEKA (gvidanto d-ro Robin-Varsovio), kiel konstanta informa kaj kolekta centro.

Pri la oficiala organo estas decidita subteni laŭeble la privatan entreprenon de d-ro Mézel, kiu intencis eldoni regulan medicinan ĵurnalon, — se lia entreprenado baldaŭ efektiviĝos.

La novelektita komitato de TEKA tuj alpaŝis al malfacila laboro retrovi la malnovajn amikojn de TEKA, nun disĵetitajn kaj dispeŝitajn pro la terura milito. Ĝi nomis Konsulojn por plej gravaj landoj (ekz. por Anglujo d-ron Primmer, por Aŭstrio d-ron Sos, por Ĉeĥoslovakujo d-ron Bischiŝky, por Germanujo d-ro Kleider, por Francujo d-ron Briquet, por Hispanujo d-ron Marany, por Hungarujo d-ron Lorand, por Holandujo d-ron Mees, por Polujo d-ron Helman, por Usono d-ron van Becelaere), — komisils al ili verki kaj dissendi alvokojn al samlandaj medicinaj ĵurnaloj kaj al antaŭmilitaj TEKA-anoj, por tiamaniere kolekti ilin denove ĉe komuna tablo.

Li profunde ekspiris kaj lastfoje alrigardis la oceanon. La suno subiris. Malpeza nubeto densiĝis, kovrante enflinan malproksimajon... Super la etendita brako de la „Libereco“ fajroj ekbrilis.

La vaporŝipo malpleniĝis. Du mevoj levigis de sur la mastoj kaj, sin balancante en la aero, flugis kun la vento al la nebuloita senfinaĵo...

Ili memorigis la mevojn, kiuj iam meze de la oceano flugis de sur la ŝipmastoj tien returnen... Eŭropon, kunportante el la nova mondo scipiron al la malnova patrolando

— Fino. —

Ĉiutagaj Negravaĵoj.

De Anton Wildgans.*

Traduktis Walter Lippmann.

I.

Nenio tiel tuŝas la koron, kiel la havaĵetoj de la mortintoj: iliaj vestoj kaj tolaĵoj, kaj ĉiuj la realitaj objektoj. Solece ili kuŝas en la ĉambro kaj atendadas, ke denove manoj ekprenu ilin per karesaj varmiganantaj fingroj. Ili frostas tiom kaj subite havas okulojn, kiuj petas, ke oni ne malŝatu ilin. Sed jam venas la homoj, disigas ilin laŭ valoro kaj nevaloro, metas flanken la uzeblajn kaj kunamasigas la ceteron. Kelkio troviĝas tie. Jen: la mortinto ankaŭ aĉetis novajn okulvitrojn, en lia leterujo estas ankoraŭ markoj kaj en la kesto de lia skribotablo tri, kvar cigaroj, ŝparitaĵo por speciala okazo. Nun ilin prenas la heredinto kaj ekzamenas, ĉu ili estas sekaj. Tiam li bruletigas unu kaj fumas ĝin

*) El: „Und hätte der Liebe nicht...“ (Kaj se vi ne havus amon...). Ciklo de novaj poemoj. Eldonis Axel Juncker, Berlin-Charlottenburg. La originala teksto estas dividita je po 16 linioj kun po 5 akcentoj sen rimo kaj sen regula ritmo. La traduko ne imitas tiun arbitran dispartigon de la frazoj, kiu donas al la preskaŭproza teksto nur la aspekton, ne la esencon de poemo.

Sed sen propra organo tia laboro estas ĉiam tre malfacila, kaj propran organon la komitato do ne povis aperiĝi pro manko de mono. D-ro Mézel silentis, kaj ni komprenis bone la malfacilaĵojn, kiujn renkontas unu homo, se li volas eldoni nun gazeton.

En tiu momento turnis sin al TEKA la ankaŭ ĵus restarigita „Internacia Scienca Asocio“ kun propono labori kune, verbi kune, kaj promesis doni al TEKA, kiel memstara sekcio de la Scienca Asocio, konstantan lokon en la baldaŭ aperonta „Scienca Revuo“ por oficialaj komunikoj.

La C. K. de TEKA post longa kaj detala pripensado kaj post aprobo de kelkaj eminentuloj (ekz. generalo Sebert, ing. Rollet de l'Isle ktp.) decidis akcepti la proponon de la Sc. Asocio kaj prilabori kondiĉojn de kuna laboro. La lasta tasko estis komisiata al d-ro Bischiŝky.

Tiamaniere la TEKA-anoj havas nun tujan profiton: ili fariĝas samtempe, sen speciala aldona kotizajo, anoj de TEKA kaj de Sc. Asocio. Fortigante la lastan per sia nombro, ili ebligas la pli rapidan eldonon de la Scienca Revuo, kiu estos ankaŭ la oficiala organo de TEKA kaj en ĉiu numero enhavos oficialajn komunikojn de la C. K. de TEKA.

Restas nesolvita la bezono de faka medicina organo, kiun ni nun ne povas ankoraŭ eldoni. Se d-ro Mézel sukcesos aperiĝi sian „Medicinan Revuon“, la TEKA plezure amike kunlaboros, liveros fakajn materialojn, enketojn ktp. Se ne, ni post kelka tempo penos mem eldoni fakajn organon, eble kiel aldono al la „Scienca Revuo“, aŭ memstaran.

Ĉiokaze nun ni povas kun ĝojo konstati, ke komenciĝas por TEKA nova periodo de regula kaj serioza laboro, ĉar ni kune kun la Sc. Asocio prezentos sufiĉe gravan kaj bone organizitan anonon, kaj post nelonga tempo havos bonan organon, ligontan ĉiujn sciencistojn.

Estas eble por ni pli agrable posedi tuj propran oficialan organon, kiel antaŭ la milito; sed ni pensas, ke pli praktike estos, se ni kune havos unu bonan organon, ol se ĉiu el ni havus propran, sed nesufiĉan, malriĉan, neallogan. La nunaj valutaj cirkonstancoj kaj aliaj malhelpoj en la tutmonda interkomunikado konsilas ja ĝenerale ne dispartiĝi, sed kunagi, kunlabori, koncentriĝi.

Cetere ĉiu el la du Asocioj ricevas profitojn:

I. La Scienca Asocio ricevas tute senpene, aŭtomate, novajn anojn — kuracistojn, kiuj plirligis ĝian anonon, krom tio la TEKA-konsuloj kaj reprezentantoj samtempe propagandos kaj laboros por ambaŭ asocioj.

II. La TEKA reciproke profitos de la propaganda laboro de delegitoj de la Scienca Asocio, — ĝi tuj ricevos lokon por siaj oficialaj soliloj, — fine, kvankam fariĝante sekcio de la Sc. Asocio, ĝi tamen konservos plenan memstarecon en sia interna organizado, sian C. K. ktp.

Komuna profito estos pli granda forto de ambaŭ asocioj dank' al kunvivo, pli graveco de ilia komuna voĉo, fine la ebleco de kuna aranĝado de kunsidoj dum internaciaj Esp. kongresoj kaj dum neesperantistaj internaciaj kongresoj, kuna dissendado de enketoj, demandoj kaj deziroj.

La C. K. de TEKA afable turnas sin nun kun peto al ĉiuj kuracistoj-esperantistoj aŭ Esperantistoj, ke ili bonvolu tuj eskribiĝi en la TEKA'n. Akceptas aliĝojn: 1. D-ro Bischiŝky, Praha, str. Mikulaŝka 12; 2. D-ro Briquet, Lille, str. de la Bassée 31, Francujo; 3. D-ro Austerlitz, Bardiov, Ĉeĥoslovakujo; 4. D-ro Döhler, Riesa a. Eibe,

II.

Oni rigardu la edzinojn de l' suboficistoj: kun korbo sur la brako ili iras por aĉeti kaj staras antaŭ la legomvendejoj, elektas la plej malkaran kaj eĉ tie provas marĉandi. Longe daŭras tia aĉeto: ofte la mano pene flegita kaj blanka, konservita devas remeti, kion ĝi jam ekprenis, pro troa kosto. Sed la rigardoj estas ankoraŭ direktitaj sur ĝin. Poste dikaj kuiristinoj venas kaj sin premas antaŭen kaj etendas la ruĝajn, krudajn kaj nehezitantajn manojn al tio kaj tio multekosta kaj bona, kaj aĉetas per fremda mono por homoj, kiujn ili ne amas. Sed tiuj virinoj dolĉe zorgante por la edzo laca estus pretigintaj la delikatan junan legomon kiel unuan donon de l' printempo — nur por rideto.

III.

La familioj de la malriĉuloj dimanĉe eliras al la verdejo. Ili prenas kun si mangajojn malvarmajn kaj panon. Tiam ili kuŝas sur la herbejoj kaj lasas brill la sunon en siajn vizaĝojn mizerajn, etendas la korpojn kaj sentas la malvarmetan tuŝon de la tero bonodora. La blondaj, anemiat knabinoj ridas kelkfoje kaj kolektas florojn. La virinoj trikante kalkulas la kostojn de la tago. La viroj estas lacaj kaj dormas ĝis la vespero. Tiam ili migras preter ĝardenoj, el kiuj logas muziko kaj lumo, bonodoro festena kaj zumado de multaj gajaj homoj. Tie la infanoj plendas: malsaton kaj ne lasas forĝi sin de la helaj ĝardenoj. Sed la patro sincere diras: Tio ne estas por ni

IV.

Laboristoj riparas la straton — nun sonorilo anoncas tagmezon. Tintante refalas la brako levita kun la fosilo. Tiam ili iras malrapide al siaj jakoj, kiuj kuŝas kvazaŭ amaso da ĉifonoj sur la rando de l' strato kaj prenas el la poŝoj sian mangajon pakitan en uzitaj gazetoj. Rekte starante ili apogas siajn dorsojn kurbigitajn al

Goethestr. 55, Germanujo; 5. D-ro Robin, Varsovio, str. Marszalkowska 115, Polujo; kaj ĉiuj landaj konsuloj.

Kolegoj! De la nombro de anoj dependas do la momento de la eldono de la Scienca Revuo kun TEKA-komunikoj. Ni kune bezonas proksimume 600-800 anojn kaj la trionon ni jam havas.

La konsuloj de TEKA la C. K. afable petas tuj verki nacilingvaj alvokojn, fari paroladojn, trovi eminentulojn, monferojn ktp. Elspezojn la konsuloj bonvolu noti kaj poste reteni el la kotizajoj de varbotaj anoj.


Kotizajoj por apartaj landoj estas difinitaj en Praha, ekz. por francoj 5 frankoj, por germanoj 20 markoj ktp. Sed mia persona opinio estas, ke pli oportune estos nun fiksi unu kotizajon (minimuman), ekz. 10 francajn frankojn; aliaj landoj enpagu ekvivalenton de 10 francaj frankoj en sia mono laŭ la taga kurzo. Tio faciligus la budĝeton kaj kalkulon. Komprenoble la TEKA danke akceptos pli, kiel monoferon. Por la 10 fr. frankoj ĉiu TEKA-ano fariĝos samtempe ano de TEKA kaj de Sc. Asocio por 1922, ricevos la Scienca Revuon kaj, se ĝi aperos, ankaŭ la eldonojn de la TEKA fakajn organojn. La monon ĉiu bonvolu sendi ankaŭ al la supraj adresoj.

Kunfratoj! Ne prokrastu la aliĝon!

En la nomo de Centra Komitato de TEKA:

D-ro W. Robin

(Gvidanto de Centra Oficejo de TEKA.)



Al „Bildoj pri la transmara reveno de ĉsl. legioj el Siberio“:

„Magistrala“, fervoja linio en Siberio.

Sugesto al Instruistoj de Esperantaj kursoj por junuloj.

Kion instruas Esperanto al junaj lernantoj pri aliaj nacioj kaj landoj?

Inter la multaj movadoj, kiujn la dum- kaj postmilita tempo kreis en Anglujo, kaj supozeble ankaŭ en aliaj landoj, la movado por ŝanĝi la ĝisnunan edukadan sistemon en la lernejoj estas la plej grava kaj notinda. Multaj komisionoj kaj komitatoj starigis, privataj aŭ oficialaj, kiuj estas tre aktivaj en diversaj partoj de la lando rilate al la edukada problemo. Ilia celo estas doni konsilojn al la registaro pri necesaj ŝanĝoj.

Unu el la edukadaj temoj multe pridiskutitaj en tiuj rondoj estas la instruado de Historio en la lernejoj, speciale Moderna Historio, kiel ĝi efikas la internaciajn rilatojn. Prof. Webster, profesoro de Moderna Historio en la Liverpoola Universitato, antaŭ nelonge publikigis leteron en la „Times“ koncernantan la diskuton, en kiu li diras:

„ke la instruado de historio en ĉi tiu lando (Anglujo) estis ĝis nun tro memcentrigita, ke vere internacia kooperado estas neebla, ĝis la nacioj lernos kompreni unu la alian pli bone, kaj tiam oni nur povas efektiviĝi per kompleta ŝanĝo de metodo en la instruado de moderna historio.“

muro en ombro. Aliaj kuŝas fumante picon laŭlonge sur la tero. Aliaj dormas. Ĉiuj silentas. La suno brulas vertikale de supre. Nur kelkfoje aerbloveto pelas iun el la ĉifitaj gazetfolioj susurantaj sur la pavimo. Jen maljuna viro ĉifonvestita venas de post la angulo. Li kliniĝas pene al ĉiu papero, ĝin faldas zorge kaj metas en korbon kvazaŭ ion multekostan. — Ĉiam aliaj homoj estas ankoraŭ pli malriĉaj.

Mankas literaturaj manuskriptoj.

„La Senlingvulo“ finiĝas en la hodiaŭa numero. Ne emante denove komenci longan felietonon kun kelkdekaj da daŭrigoj, ni nun bezonigas bonajn literaturajn manuskriptojn: originalajn kaj tradukitajn. Ni preferas tiajn, kiuj okupas pleje tri substrekajn felietonojn de ET, tiel ke ni povas tute publikigi ilin en 1—2 numeroj. Verkemajn legantojn ĉiulandajn ni petas pri vigla kunlaboro.

Por „Esperanta Ligilo“

alvenis jenaj pluj donacoj:

176. Esp. Grupo Worms 50 gmk. — 177. Ed. Bellon, Montreux 1 sviz. fk. — 178. M. Chmirilinski, Warszawa 200 pmk. — 179. S-ino Gerstenengst, Timiŝoara, Rum. 25 gmk. — 180. Esp. Literatura Asocio 30 gmk. — 181. Orienta Grupo de Zweigverein Dresden de GEA 15 gmk. — 182. Johanna Zschepank, Dresden 10 gmk. — 183. Kolekto de prof. L. Cailliet, La Mure 50 fr. fk. — 184. J. E. Bunzi, Praha 1 fr. fk.

La profesoro kontrolas en la Universitato la historian scian branĉon kaj estas respondeca por la edukado de histori-instruistoj por la popolarnejoj. Li estas tre bone konata tra la lando, aparte pro siaj simpatioj al la Ligo de Nacioj kaj por sia aktiva kunlaboro en la propaganda flanko de la L. de N. Pli bone ol iu alia persono li scias la bezonojn de la tempo, kaj estas interese ĉi ankoraŭ aliajn rimarkojn pri tiu temo en artikolo, kiu aperis en grava Liverpoola ĵurnalo. Post siaj kritikoj pri la ĝisnunan metodoj uzitaj en la lernejoj, li atentigas al la granda intereso en moderna historio, kiu montriĝas nuntempe inter ĉiuj lernantoj, kaj li daŭrigas:

„La unua esenca neceso estas, dediĉi sufiĉan tempon, en kiu la infanoj povus lerni sufiĉe, pri la kunligo de sia lando al tiu de aliaj, kaj multe pri la vidpunkto de tiuj aliaj landoj.“

Li konstatas, ke la ĝeifanoj en ĉi tiu distrikto, kaj supozeble ankaŭ en aliaj, estas ege avidoplenaj por scio pri la historio kaj la institucioj de aliaj landoj, kaj ili mem bonvenis kore la aktivadon de la Ligo de Nacioj. Ili montris tion per organizo de sukcesplena simila organizo de junuloj en siaj rondoj, kaj ili serĉas per tiu organizo havigi al si diversajn informojn pri temoj rilate al aliaj landoj, kiujn ili konsideras gravaj por sia estonteco.“

Jen gravajo por nia movado, kiun ni ne devas malatenti, kiam la Internacia Konferenco pri Esperanto en lernejoj okazos en Genève. Estas nepre necese, ke la delegitoj, kiuj iros tien, havu kun si plenajn kaj detalajn informojn, pri la rezulto de akiro de tiu scio — kunligo de sia lando al tiu de aliaj kaj la vidpunkto de la aliaj landoj — ĉe la junaj lernantoj, kiuj studis Esperanton.

Multaj, preskaŭ ĉiuj el tiuj lernantoj, korespondadis per Esperanto kun eksterlandaj lernantoj, kaj certe havigis al si informojn kaj scion pri tiuj landoj, kiun aliaj lernantoj ne posedas. La instruistoj do kolektu la korespondadojn kaj zorge tralegu ilin por elĉerpi el ili la necesan materialon utiligitan por tiu celo. Oni povas esti certa, ke tia laboro valoros la penon kaj kondukos al plej utilaj rezultoj.

J. D. A.

Komercio.

La IV-a Internacia Foiro du Praha okazos de 12-a ĝis 16-a da marto 1922. Por tiu ĉi foiro la administra estraro dissendis Esperantan invitolon same kiel por la III-a foiro.

Artofiro de Frankfurt.

La VI-a Artofiro de Frankfurt a. M. (Germ.) okazos de 26. marto ĝis 17 aprilo. Informojn donas la oficejo de la Artofiro. Adreso: Geschäftsstelle der Kunstmesse im Römer, Frankfurt a. M.

Laboristaro.

Inter la laboristaro de Dresden Esperanto bone progresas. La laborista esperantista grupo post vigla propagando en septembro povis malfermi 11 kursojn kun pli ol 300 partoprenantoj. Sekvis en oktobro 12-a kurso. 13-a estas aranĝita en decembro por la junularo de la „Sindikato Centra de la Privataj Oficistoj“. Ĝin ĉeestas 36 gelnantoj.

Pro pluraj anoncoj la grupo okazigis en januaro 1922 14-an kurson, kiun partoprenas ĉ. 55 gelnantoj. Ĉiuj kursoj okazas en lerneja ĉambroj.

La tri lokaj laboristaj gazetoj nun pli ol antaŭe favoras Esperanton.

En la apudaj laboristaj grupoj Preit kaj Heidenau estas po du kursoj kun ĉ. 100 partoprenantoj kune.

1919.

Silente neĝas... Post nuba vualo

sin kaŝas la luno pro sangabomen'. Tra la mortvoka muteco en valo subite eksonas soldata blasfem'. La neĝo siblas sub glitveturilo. Por vivo petegas infana helpekri'. Apude sidas, en man' kun fosilo, la patro, sen larmoj pro mortapati'

Post veturilo: — rajdantaj kozakoj, pafilojn tenantaj por fero de l' juĝ', malsataj korvoj kaj... knaras sur brakoj la ĉenaj katenoj en la ventomug'. Nun haltas la veturilo... Silento. Kelkfoje aŭdiĝas nur flustra ordon' kaj duonronde la nokta taĉmento vicigas por lasta funebra kordon'.

La patro fosas... Apude en sveno lin spasme, sen ve', ĉirkaŭprenas fler'. La tombo, propre fosita por sceno de homtragedio, atendas en pret'. „Je nom' de l' leĝo!“ — soldat' kun aplombo' nun legas pormortan verdikton de l' stab'. La vir' genuas ĉe rando de l' tombo, al koro amanta sin premas la knab'

„Mi devas morti kaj mortos sen timo, eĉ palo hontiga ne tremas sur vang'. En lasta horo de mia animo rezigne, sed firme profetas la lang', ke mia morto — la sorto montrita por Vi, ho patrujo kaj tuta mond', ĉar, kredo, de Vi mem estas fosita la vin atendanta eterna tomb'!“

Mallonga preĝo... Je kri' de l' komando. Subite ektondras la paf' post moment'. Du sangaj korpoj enfalas de l' rando kaj ĉion surkovras la neĝa sileni'

Julio Baghy.

Krom la supra rekta raporto ni elĉerpas el la organo de GLEA jenon: La grupo en Kassel komencis novan kurson, kaj ankaŭ havas kursojn en Sandershausen, Ochshausen, Oberzwehren, Niedzwehren. En la akademij laboristaj kursoj en München Esperanto estas enkondukitaj, kaj speciala kurso por libropresistoj komencis.

Tipografistoj.

Por pruvi la utilecon de Esperanto al la tipografistaro, la Esp. tipografistoj de Leipzig (Germ.) fondis „Tipografistan Esp. Grupon“. Adreso: Volkshaus, Zeitstr. 32. Ĉiuj tipografistaj grupoj kaj izolulaj esperantistaj estas afable petataj sendi sian adreson por informaj aferoj.

En Lodz (Pollando)

okazas vigla propagando inter laboristoj. La 17. jan. komenciĝis samtempe 4 kursoj du junulaj, gvidataj de s-o Lejzerowicz kaj f-ino Kopf, kaj du matur-ajuloj, gvidataj de s-anoj Zys kaj Hiller.

— Esp. Soc. „Laboro“. la plej vigla el la Esp. grupoj de Warszawa, nun ankoraŭ plivastigas sian propagandon. Por plivigligo de la interna vivo kaj kiel ligilon inter la diversaj fondiĝontaj filioj de „Laboro“, ĝi eldonas „Bulnon“. Okazas 5 kursoj kun sumo 118 partoprenantoj Post finiĝo de la kursoj oni aranĝos specialajn ekzamenojn.

54-a Konferenco de Lancashire kaj Cheshire Federacio.

La 54-a konferenco kaj ĉiujara kunveno de la Lancashire kaj Cheshire Federacio Esperantista havis lokon sabato la 28-an de januaro en la urbdomo de St. Helens.

Lia urbestra moŝto bonvenis la konferencanojn en la bela konsilantara ĉambro kaj esprimis en bonega parolado sian tutan simpatian kun la Esperanta movado kaj ĝia alta idealo. Li opinias, ke la sola solvo de lingvo internacia dependas de la juna generacio, kaj promesas helpi ĉe loka edukada komitato pri enkonduko de Esperanto en lernejojn.

La sekretario raportis, ke la meznombra ĉeestado de la kvaronjaraj konferencoj en 1921 estis 70, kion oni povas konsideri kontentiga pro la malfacilaj tempoj kaj la grandaj vojaĝelspezoj. La bilanc-raporto estis akceptata.

Rezolucio estis proponata de s-o J. D. Applebaum kaj unuanime akceptata, ke la Federacio kore dankas al d-ro Nitobe pro liaj klopodoj en la intereso de internacia lingvo kaj subieno de Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj, kaj al d-ro Privat pro lia grava kaj valorplena laboro por nia movado ĉe la Ligo de Nacioj kaj aliaj rondoj.

La konferenco decidis sendi 2 delegitojn al la Ĝeneva konferenco pri Esperanto en lernejoj kaj ~~post ilian elpiron el la federacia kaso.~~ Oni tuj efektis komitatojn, kiu decidis pri personeco de la delegitoj.

Nova estraro estas elektita por la jaro 1922, kaj oni akceptis la inviton de Liverpool, okazigi la konferencon de aprilo en tiu urbo.

La konferencanoj poste altablighis al bonega teomanĝo preparita de la lokaj samideanoj en la kooperativa halo, kaj la vesperon oni ĝuis per dancado kaj kantoj. Profesoro Collinson faris dum paŭzo propagandan paroladon al granda ĉeestantaro ne-Esperantista. J. D. A.

Katolikaro.

„Espero Katolika“.

Ni ricevis la januaran numeron de tiu ĉi katolika revuo. Ĝi estas ĉ 100-paga, sed la

Oficialaj Scilgoj

pri la

Sciencaj Organizaĵoj.

Raporto (komp. ET n-oj 63 kaj 66).

Kun ĝojo mi povas diskonigi, ke la ampleksa propagando je jarfino evidente bonefiks. Ĉar la nombro de la aliĝintoj kreskis al 310 el 31 landoj. Tiu nombro ne entenas la varblitojn, kiuj sin anoncis ĉe aliaj komitatanoj en la lastaj 4—6 semajnoj, kaj ankaŭ ne la TEKA-anojn el la granda plimulto de la diversaj landoj!

Por detruu tian konfuzon: la interkonsento kun TEKA estas definitiva. Ĉiuj TEKA-konsuloj estu petataj baldaŭ sendi sian membrolistojn. TEKA-anoj ne sendu apartajn aliĝilojn; tamen estus dezirinde, ke ili deklaru sian abonintencon.


Por plifaciligi kaj plitrapidigi la akiron de interesuloj en landoj sen aktiva komitato, mi petis la sekvantajn TEKA-konsulojn, ke ili simple akceptu aliĝilojn por ISA el siaj landoj:

- D-ro Edmund Sos, Tuchlauben 18, Wien I por Aŭstrio
- D-ro Roberto Maraury, (nuntempe en) San Fernando por Hispani.
- D-ro Lorand, Kossuth hajos ut. 10, Budapeŝt IV por Hungari.
- Munlong Hosanmen, Zyunsenkun Heiannando, Korea por Japani.

Por kelkaj landoj ni devus nov- aŭ alifiksi la kotizojn legeblajn en la flugfolio. Nuntempe valoras jenaj ŝanĝoj aŭ aldonoj

Por poloj: 250 M., 500 A., 625 M. A., pol m.; por hungaroj: 60, 120, 150 kr. hung.; por aŭstroj: 500, 1000, 1250 kr. aŭst.; aŭ en germ. mono: 20, 40, 50 mk. germ.; por turkoj: 20, 40, 50 mk. germ. por japanoj: 5, 6, 7 1/2 Yen.

Denove mi atentigas, ke oni ne jam sendu kotizojn; la adreso de la kasisto estos baldaŭ



Subtera tramvojo, 125 m sub la strato.

En New York oni konsideras la proponon de inĝenero, konstrui subteran tramvojon 125 m sub la strato. Ĝi kunligus, irante sub la Hudson, Manhattan, New Jersey kaj New York. En tia profundaĵo oni ne bezonas timi la enpenetron de akvo; la reloj povus iri rekte ne respektante la direkton de la siraĵoj kaj la supraĵojn, tiel ke tre granda rapideco povus esti atingata. La pasaĝerojn oni transportus en 30 sekundoj el la profundaĵo al la tega lumo.

enhavo konsistas bedaŭrinde preskaŭ ekskluzive el polemikoj kontraŭ lka kaj ĝia fondinto d-ro Meyger. Ĉar ni ne estas kompetentaj pri la disputo inter la Esp. katolikaro, ni petas niajn katolikajn legantojn interesigantajn pri tiu afero, mem legi la novan numeron de „E. K.“ Adreso „Espero Katolika“ en Udenhout, Nederlando.

En Monaĥejo de Franciskanoj en Villach (Aŭstrio, Karintio) estas aranĝita Esp. kurso.

Lernejo.

Oficiala aprobo de Esp. lernolibro.

La ĉeĥoslovaka ministerio de lernejaferoj aprobis per dekreto de 30. sept. 1921, n-o 90487, la lernolibron por ĉeĥoj de faka instruistino J. Šupichova kiel taŭgan lernhelpilon por ĉeĥaj mezaj kaj burĝaj lernejoj.

Esperanto ĉe la Universitato de Tartu.

Laŭ decido de la Universitata estraro en la Universitato de Tartu (Dorpat) okazos unufoje ĉiusemajne lekcio pri Esperanto.

Mallongaj Esp. Scilgoj.

Philadelphia kongresurbo por 1926?

Agemaj Esperantistoj de la urbo Philadelphia, Pa., Usono, agadas, por ke internacia Esp. kongreso okazu en tiu ĉi urbo en la jaro 1926; ĉar tiam okazos en Philadelphia granda internacia ekspozicio, kaj estos finita admirinda majstroverko

publikigata. Ĉar kelkfoje okazis, ke libervolaj mondonacoj afable senditaj de germanoj al mi, ne atingis min. Mi klarigas, ke mi ne posedas propran poŝtĉekkonton, kaj ke oni devas senpense skribi la tutan adreson cititan en mia flugfolio, do: „Postscheckkonto Nr. 24387 en Leipzig, der Sparkasse Riesa für Girokonto 1505.“

Plue mi petas korektan afrankon, ĉar mi jam plurfoje devis pagi altan punpagon.

Pro la bonaj progresoj mi jam estas intertraktanta kun kelkaj eldonejoj, ke oni povas esperi la 1-an numeron de la „Revuo“ certe la 1-an de aprilo.

Riesa, la 26-an de januaro 1922.

D-ro Walter Döhler, sekretario.

Dua kvitanco

(decembro 1921)

de libervolaj donacoj por la aranĝaj laboroj.

- | | |
|-------------------------------|-------------|
| 1. Cernohostov, Alberga | 100 gmk. |
| 2. Alessio, Padova | 20 lir. |
| 2. Wagner, Sibiu | 20 gmk. |
| 2. Arcioni, Milano | 50 lir. |
| 3. Padfield, Bath | 114 gmk. |
| 6. Tamverk, Haapsalu | 20 fmk. |
| 6. Robin, Warszawa | 50 gmk. |
| 10. Urban, Glasthite | 20 gmk. |
| 12. Alavedra, Tarrassa | 20 fr. frk. |
| 20. Qultteck, Gross-Strehlitz | 10 gmk. |
| 23. Laur, Tarto | 20 gmk. |
| 27. Fröhlich, Werdaŭ | 10 gmk. |

Koran dankon al ĉiuj!

Letero el Romo.

25 jan. 1922.

Post la morto de Lia Papa Moŝto (22. jan.) kaj post lia funebra transporto antaŭe en la preĝejojn de Sankta Petro, kien en la du tagoj de la publika elmontrado venis, laŭ la kalkuloj,

de l' tekniko: ponto transriveron Delaware, kiu kunligos Philadelphia'n kun Camden. La ponto kostos 29 000 000 da dolaroj (fantazia sumo por malbonvalutulo: ĉ. 5800 000 000 germ. mk. aŭ 290 000 000 000 aŭstr. kronoj.)

Post longdaŭra vojaĝado tra diversaj landoj kaj gastado en sia naskiĝlando Svedujo, revenis al Usono, urbo Rockford, Illinois, agema Esperantisto Karlo Fröding, kies energio ekfervorigis multajn samideanojn. (K V.)

Francujo.

La 18. jan. s-o Pillault paroladis en Orléans kun lumbildo pri la kongreso de Praha. — En La Mure (Isère) prof. Caillet gvidas kurson kun 30 partoprenantoj. — En Versailles okazas kurso ĉiutage en la urbdomo.

Estonio.

La 15. jan. prof. K. Väisälä paroladis en Tallinn pri Esperanto antaŭ ĉ. 400 personoj. — En Haapsalu estas registrita oficiale Esp. Unuigo „Radio“. — Vidu ankaŭ sub „Lernejo“.

Parolejo.

112. La sveda karavano al Praha.

(Rilatas al 108 kaj 111.)

Respondo al s-o Iabrucker en ET de la 1-a de januaro. Kiel s-o I. ne demandis nin pri la rezultato de nia karavano, antaŭ ol li skribis publike pri la valoro de la metodo. Kiel li povas ŝeli, ĉu la metodo estas aprobinda aŭ ne? La metodo donis efektajn rezultatojn trifankajn: La neesperantistaj karavanoj fariĝis interesataj Esperantistoj,

preskaŭ 100000 personoj, kaj poste en la Vatikanaĵoj grotajn (kie estas la restaĵoj de l' antaŭrenesanca baziliko). La 1. febr. post naŭtaga atendo, ĉiuj kardinaloj kunvenintaj en Romo unuigis en la Konkilavo.

La kutimo enfermi la kardinalojn kaj malpermesi la komunikojn kun la ekstero komenciĝis en la jaro 1268. Ĉar la kardinaloj post multaj monatoj ankoraŭ ne estis elektintaj la ĉefpastron, la loĝantaro de Viterbo, kie ili estis, malpermesis ilian eliron. Post malmulte da tempo ili elektis Gregoron X-an, kiu en la jaro 1274 kun la brevo „Ubi periculum“ provis liberigi la estontajn elektrojn de laikaj influoj.

Nun la kardinaloj estas 61 (ilia maksimuma nombro estas 70). El ili 31 estas italiaj, po 5 francaj kaj hispanaj, 4 anglaj, 3 germanaj, po 2 aŭstraj, polaj, usonaj, kaj po unu belga, kanada, brazila, portugala, nederlanda, hungara, ĉeĥoslovaka.

En la proksima Konkilavo oni havos du tendencojn pri la repaciĝo kun la itala registaro: la tendencoj daŭrigi la politikon de Benedikto XV-a, kiu pli-malpli frue estus verŝajne kondukinta al plena repaciĝo, kaj la kontraŭan. Al kiu la venko? Eble al la unua. Elio Migliorini.

Letero el Pola lando.

Bydgoszcz, februaro 1922.

La tempoj, kiam ĉiu internacia rilato estis sufokigita, feliĉe forpasis. Plej multe suferis sub tiu jugo de malviveco la komerco. Sed tuj, post kiam la mond milito estis finiĝinta, ankaŭ la mondinterilatoj rapide revigligis. Nur en Pola lando tiuj ĉi interrilatoj ankoraŭ tom dormetis, malhelpataj per la milito kontraŭ la bolŝevikoj kaj diversaj internaj krizoj. Nun, post kiam malaperis la ĉefaj malhelpaĵoj, ankaŭ ĉi tie ĉio revigligis al nova, esperplena vivo. Certe malrapide progresas la renovigo de la ĝis nun interrompita rilato kun



Ni migras...

Nun superŝutas montopintojn La suno per brilanta oro, Admonas milde la halflintojn Pri ekvenanta nokthoro. Ni migras, kaj nin ĝojo movas Pro ĉio bela kaj supera, Ho, kion ni en mondo trovas. De l'riveret' murrnur' libera Agordas korojn por plezuro; Ekvivas rokoj kaj arbaro, Ekvivas de la mont' konturo; Kaj kun la nokta ombra maro Gigantbatalas lumo lasta. — Ni migras, sed ni kvazaŭ dormas, Kaj fantazi' en turno vasta Ideojn strangajn sonĝe formas. Sed tamen — kia realeco! Ŝprucanta kia sanoforto! Sur tiu kaŝa teropeco Plenumiĝanta kia sorto! — Ni migras, migras kun la vivo, Kunplektas mute sortilgilojn, Dum transe sur la montdeklivo Forpelas nokto lastajn brilojn. Kaj pli kaj pli trunkvile fluas La viva font' en nia koro, Dum stelojn ni admire ĝuas En sorĉa lum' dum ombra horo. La homa voĉo nun silentas, Sanktiĝis pura l' atmosfero: Klarecon de l' ide' ni sentas, Ni sentas spiron de la vero.

N. Barthelmess.



Esperanto fariĝis konata kaj respektata en vastaj rondoj de nia lando, fine la karavano aliris ĉie al si la atenton. Ni povas konstati, ke 75% de la varbitoj restas fidelaj al nia movado. Multaj el ili estas tre fervoraj. La propaganda efiko superas niajn atendojn.

Ni ankaŭ uzis la vojaĝon por propagando per la gazetaro. En 25 grandaj svedaj ĵurnaloj 4-kolonaj artikoloj aperis pri nia karavano.

Cu ne estas aprobinda la ideo unue montri al la homoj, kio estas Esperanto? Poste oni ne bezonas varbi iun por nia afero, ili v arbiĝas.

Ni estas kuitimigataj je konstanta kalumnio de la ldistoj. En nia lando ja estas la ĉefa forlikajo de la ldistoj. Ni tamen ne ploras pro ilia kalumnio, eĉ ne timas ilin. „Ni semas kaj semas konstante“. La propagandaj efikoj de ilaj karavanoj certe superas la eventualan malutilon de la ldistaj kalumnio.

Ni havis la intencojn aranĝi karavanon konsistantan parte el neesperantistoj por montri al ili Esperantistan kongreson. Nur la Esperanto-sciencistoj ni volis anonci kiel partoprenintojn de la kongresoj en Praha kaj Dresden. Pri tio ni skribis al la kongreskomitatoj. Post kiam la karavano estis organizita, ni ricevis komunikon, ke ni ne ricevus loĝojon por la karavanoj, ne aliĝintaj al la kongresoj. La kongreskomitatoj tiamaniere devigis nin pagi kongreskotizojn por ĉiuj karavanoj, ankaŭ por la neesperantistaj.

Ni pripensis la eblecon aranĝi karavanon vojaĝojn por propagando celoj, sed sen interligo kun la Esperantistaj kongresoj. Se la samideanoj en kelkaj landoj estus volontaj nin helpi en tiu afero, ni estus tre dankemaj pro komunikoj pri tio, sed la samideanojn, kiuj ne ŝatas propagandajn karavanojn, ni evitos.

(Henning Halldor, karavangvidanto.)

Recenzoj.

LIBROJ.

GUIDA TEORICA E PRATICA PER LO STUDIO DELLA LINGUA INTERNAZIONALE ESPERANTO. Parte I: Grammatica comparata, Esercizi, Corrispondenza commerciale. Letture. Parte II: Vocabolario Esp.-italiano ed Ital.-Esperanto con richiami al Teatro. Verkita Pi-ro Camelli kaj Pietro Rota, instruistoj en Milano. 373 pg. 12:17 cm. Mendebila ĉe la Federazione Esperantista Italiana, Milano, Via Rossari 2. Prezo ne montrita.

Komparinte ĉiujn ĝis nun ekzistantajn Esp. lernolibrojn por italoj mi devas konfesi, ke la elaboritaĵo de Camelli kaj Rota estas lnda, okupi altan lokon por detaleco kaj kompleteco. Ĉiuj partoj de la gramatiko, precipe tiu pri la verbo, estas ĝisfunde prilaktitaj. Pro tio, ke la libro entenas eĉ leĝerajn kaj vortaron ĝi estas speciale praktika por ĉiuj, dezirantaj posedi kompletan lernilon en unu volumo. — Kiel fungoj la gramatikoj elkreas el la tero, bonaj kaj malbonaj. Opineble la fakto estas bona signo, ĉar laŭ la multeco de la Esp. libroj ni povas taksati la evoluon de nia movado. Ni esperu, ke ankaŭ ĉi tiu verko helpu al la diavantaĝo de Esperanto en Italio. — Mi trovis kelkajn preararojn kaj lingvajn nebonaĵojn, kiuj estas facile forigeblaj; sed mi miras, ke la aŭtoroj ankaŭ uzis kelkajn komercajn leterojn de s-o de Beaufort por sia libro. Kiel ĉiam pruntepreni ĉe aliaj? Sendube ĉiu gramatiko estas parte komplintaĵo; tamen ne estas necese, ke oni uzu jam kelkfoje prestajn leterojn. (G. Ajl.)

ELEMENTAR-LEHRBUCH zur Erlernung des Esperanto. De Guido Otto. 4-a eldono. 19 1/2 : 19 cm. 128 pg. kaj kovrilo. Eldonis Fr. Ellersiek, Berlin S. 89. Prezo 18 gmk. (por bonvalutaĵo landoj 18 gmk.)

De la libro jam 18000 estas venditaj. Per tio ĝia taŭgeco jam estas pruviata. La verkisto akvas la principon unue doni al la lernanto la ekzemplojn de la lingvo, por ke nur poste la reguloj de gramatiko kaj vortaro estu trovataj. Kvankam diversaj partoj ne plene plaĉas al mi — kelkfoje la verkisto supozas tro multe da scio pri gramatiko — la libro tamen havas multajn preferojn. La aldolitaj leĝaĵoj estas bonaj, simplaj kaj laŭfundamentaj, samtempe informante la lernanton pri nia movado. Laŭ deziro de d-ro Zamenhof la gramatiko de la Fundamento estas aldolita je la fino venas vortaro Espermana kaj germ.-Esperanta. Lerta instruanto uzos la libron kun same bona rezulto por ĉiuj lernantoj. (Instruanto.)

CALENDARIO PERPETUO. Sendita de Academia pro Interlingua en Cavoretto-Torino, Italio.

GAZETOJ.

- La Revuo Orienta. Dec.
- Verda Utopio. Dec.
- Der Arbeiter-Esperantist. Febr.
- Hungara Esperantisto. Jan.
- Le Monde Esperantiste. Nov.-dec.
- Esperanto Praktiko. Jan.
- Germana Esperantisto. Jan.
- Espero Katolika. Jan.

la eksterlando, sed ĉiuj scilgoj alvenintaj dum lasta tempo estas tiel ĝojigaj kiel esperigaj. Antaŭ ĉio la diversaj kontraktoj faritaj dum lasta tempo inter la pola registaro kaj kelkaj limitajoj estas speciale gravaj por nia ekonomie-komerca karaktero. Interne de nia ŝtato oni revigligas la komercon kaj industrion ĉiamaniere.

Sekvinte la ekzemplon de aliaj ŝtatoj, oni jam dum lasta jaro aranĝis la bone organizitan I-an Poznan'an Foiiron. Plene sukcesis la „Oriental Foiroj“ en Lwow (Leopolo, Lemberg), pruvintaj sufiĉe internacian karakteron. Krom el Polio estis ekspoziciantoj el Ukrainio, Besarabio, Hungario, Ĉeĥoslovakio kaj Germanio.

En la tagoj de 19—27. marto nunjare okazos la grandstila II-a Poznan'a Foiro, kiu jam nun promesas plenan sukceson. La foiraranĝantoj, sukcesinte interesigi diversajn eksterlandajn firmojn en Francio, Italio, Hungario kaj Brazilo, disvolvas ankoraŭ plue sian sukcesplenan agadon, organizante specialan propagandon dum la Praha Foiro, okazonta de 12—19. marto tiuĉiare, Krom tio la foiresiraro dissendas ĉiulanden afiŝojn kaj propagandilojn, kiuj klarigas la celojn kaj la karakteron de la Poznan'a Foiro. La invitiloj senditaj al eksterlandaj firmoj en diversaj lingvoj finiĝas per jenaj vortoj

„La I-a Poznan'a Foiro, okazinta kun grandega sukceso dum printempo de l' pasinta jaro, ekinteresis la tutan komercistan mondon. Ĝin vizitis komercaj kaj industriaj reprezentantoj de tuta Eŭropo kaj gastoj el Ameriko, Egiptio kaj Japanio, sekve de tio la eksterlando starigis vastajn interrilatojn komercajn. La II-a Poznan'a Foiro certe helpos ankoraŭ plifortigi kaj plivastigi tiujn ĉi interrilatojn en la tuta mondo.“

Fine estas ankoraŭ rimarkinda, ke speciale estos reprezentata la urbo Lodz — la pola Manchester. Anonciĝis ĝis nun pli ol 100 ekspoziciantoj grandfabrikaj de la urbo Lodz, plejparte el la fibrobranĉo. Pola Esp. Servo.

La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof kaj la funebra ceremonio.

Valora memorajo por ĉiu Esperantisto.

Presita sur luksa papero.

Kun 11 ilustraĵoj laŭ originalaj fotografajoj. (Funebra procesio sur strato Teatrajna. — Sur la Tombejo. — Enterigo de la ĉerko. — Paroladoj de la predikanto d-ro Poznanski, de s-ano Grabowski kaj de majoro Neubarth. — La tombo, novaj fotoj de aprilo 1921.)

Prezo 18 germ. mk. inkluzive sendkostoj. Eldonejo de „Esperanto Triumfonta“, Köln-Horrem.

Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg.
Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen.
Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.
Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Kralov. Otto Lumpe, Trautenu.

Estona: Est. Esp. Unuĝo, postkast 6, Tallinn.
Finna: O.Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
Franca: Esp. Centra Librejo, 81 rue de Clichy, Paris 9.
Hispana: Konrado Doménech, Geron, Rambla Alvarez 12-2.
Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15-II-2, Budapest VI.
Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio.
Litova: Paŭlo v. Medem, Smeltu g-ve 12, Kaunas (Kovno).
Pola: Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm. 10, Warszawa (P. K. O. n-o 8125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.

Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj.
Sveda: Förlagsförenningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.
U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 800 Fifth Avenue, New York City.

Nederlanda Esperanta Komerco-Oficejo

(Nederlandsch Esperanto-Handelsbureau)
Diergaardelaan 64, Rotterdam (Hollando)



Tradukas cirkulerojn, komercajn leterojn ktp. el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj sin ŝargas per la dissendo de cirkuleroj.
Prokuras komercajn adresojn.
Priorogas la anoncojn en Nederlando.
Interrilatigas kun nederlandaj komercistoj kaj industriistoj.
Scligas la kurzojn de valutoj kaj valorpaperoj.

Komercistoj! Fabrikistoj!

Nur via anonco en ET ne sufiĉas!

Por atingi la interesemulojn, akiru en ĉiuj landoj, interrilatojn, kiuj speciale altiras la atenton de samfakaj firmoj al via adreso!

Por Hungarlando akceptas ilun laboron en intereso de la afero nur por repago de propraj elspezoj.
Hungara Esp. Servo, Hajos utca 15, Budapest VI.

Anoncetoj.

OFICO SERĈATA. 22-jara estona fraŭlino petegas tute egale klan oficon. Sciopovas germanan, rusan, estonan kaj Esperantan lingvojn. Adreso: Estonio, Tallinn, Malmi 18n 3 k. 7. Rita Perk.

LABORON en bonvaluta lando kiel privatinstruisto, en oficejo ktp. serĉas STUDENTON. Lerteco en stenografio, skribmaŝino, forteplano. Sicora, Halle a. S., Germ., Kasselerstr. 2.

DANKO. S-o Liudas Alseika, Dotnava, Litovio, korege dankas siajn korespondantojn pro ricevitaj kristnaskaj kaj novajaraj gratuloj kaj petas pardonon pro sia prokrasto kun respondo, ĉar li nuntempe estas treege okupata. Laŭeble ĉiu ricevos respondon.

JUNULINO, parolanta la Esperantan, francan aŭ anglan lingvon kaj kiu estos akceptata en la familia rondo (tri personoj) estas serĉata por ĉiuj laboroj; ŝi ricevos bonegan salajron. Ofertojn bonvolu adresi al s-o P. Malsbenden, Hagen i. W., Germ., Alexanderstr. 88.

SIGELMARKOJN Esperantajn eldonadas kaj liveras (ankaŭ kaŝŝtukajn stampilojn por Esp. societoj) s-o Jozefo Kocourek, gravuristo en Wien X. Aŭstr., Arthaberplatz 3-14. — Postulu specimenaron de Esp. sigelmarkoj kontraŭ 2 resp.-kuponoj. Oni korespondas ĉeĥe, germane, ruse kaj Esperante.

AL RUSLANDO! Karaj rusaj samideanoj! Vi estas petataj komuniki al la Mogileva Esp. Komitato (J. Mogilev, Klubo Esperanto, domo de klerigado, Dvorianskaja), ke la eks-sekretario de Mohileva Esp. Komitato J. Drajver nun loĝas en Varsovio, Muranovska 26/82 kaj salutias siajn lamajn kunlaborantojn.

REDAKCIJŬ DE ESPERANTAJ GAZETOJ, verkistoj de Esp. libroj kaj propagandiloj estas petataj sendi siajn publikajojn al redakcio de „Esperantys Zpravodaj“, Praha II, — 2032, Ĉeĥoslovakio (ĉeĥa poresperanta informilo), kiu rekomendos ilin al sia legataroj. Laŭplaĉe interŝanĝo de la gazeto! Senpage publikigo de adresoj!

ANTVERPENON (Belgujo). — PENSIONO POR JUNILOJ. — Profesoro de Ŝtata Mezgrada Instruado akceptas junulojn 10-18-jarajn, kiuj deziras studi ĉe Mezgrada lernejo, Athenée (Liceo), aŭ Supera Komerca Instituto. Vasta moderna domo kun elektra lumo kaj banejo. Familia vivo. Regula kontrolado pri la studado. Moderaĵprezoj. — E. Vincent, Cuperusstrato 17, Antwerpen.

Internacia bela literaturo kaj instruaj verkoj:

Bennemann Paul. **Tra la mondo.** Internacia legolibro. I-a parto: Por komencantoj. Kun multaj bildoj kaj muziknotoj. 2-a eldono. Kartonite M. 15.— La unua eldono estas elĉerpita tri monatojn post apero.

II-a parto: Por perfektuloj aperos dum Marto Dietherle Joh., Prof., D-ro, Direktoro de la Saksia Esperanto Instituto en Leipzig. **La Vendreda Klubo.** 11 originalaj artikoloj verkita de Vendreda Klubanoj. Kun unu portreto kaj kelkaj desegnaĵoj M. 20.— Prezo por bonvaluta eksterlando M. 30.—

Goldschmidt Thora. **Bildotabuloj por la instruado de Esperanto.** Prilaborita de Prof. d-ro Joh. Dietherle. 2-a korekita eldono kartonite M. 20.— bindite M. 24.—

Hebbel F. **Gyges kaj lia ringo.** Tragedio kvinakta. Esperanton tradukita de P. Bennemann M. 50.— bindite M. 50.— Prezo por bonvaluta eksterlando M. 45.—

Lippmann Walter. **Dr Zamenhofs Sprachliche Gutachten — Lingvaj Respondoj in deutscher Bearbeitung mit Ergänzungen und Erläuterungen** Kartonite M. 15.—

... kun plej bona sukcesoj kurskondukanteroj ĝin uzos kiel taŭga ilo dum kursoj por perfektuloj kaj en ekzamenoj por diplomatoj. Fridriĝi-Zürich.
Richter R. **Esperanto-Gvidanto por publika interkomunikigado.** Preparilo por la ekzamenoj pri kapableco M. 6.—

Thurston, Temple E. **La urbo de belega senŝenc-ato.** Romano el la angla lingvo, trad. de R. Spero bindite M. 30.— Prezo por bonvaluta eksterlando M. 45.—

Esperanto-Katalogo senpage laŭ peto.

Ferdinand Hirt & Sohn, Esperanto-Fako, Leipzig, Salomonstr. 15.

SILKAJ BRODAĴOJ

REKTE EL ĤINUJO, LA SILKOLANDO!

Esperanto-brodaĵo kun surskriboj esperantaj, verda stelo, globo ktp.

Bibliaj brodaĵoj kun sanktaj tekstoj. 15:20 aŭ 29:39 cm • dol. 2.50 aŭ 4.50.

Brodaĵoj de birdoj, floroj, vidaĵoj ktp. samformataj kaj samprezaj.

Specialaj laboroj laŭ modelo. Sendo per rekomendita letero.

Dol. 1.00 = 10 stamp. respond.-kup. aŭ 3 ŝilingoj, poŝtmandatoj aŭ kambioj de Thos. Cook & Son.

Specimeno kontraŭ 1 resp.-kup.

C. S. Gee,
HAI-YEN (tra Shanghai), Ĥinujo.

Korespondado en Esperanto!

Art-Amikoj,

Artajo-, Bildo- kaj Libro-Vendistoj,

kiuj havas intereson por belegaj akvareloj, oleopentraĵoj ktp. de eminentaj kaj konataj pentristoj aŭstraj, turnu sin al Sepp Osterer, Graz, Aŭstrio, Gleisdorfergasse 5.

Favora okazo por eksterlandanoj por la malalta valuto aŭstria.

Internacia Librofrezoro.

Kolekto de elektaĵoj kaj rekomendindaj romanoj, noveloj, humorajoj, poemoj ktp.

Kajero 2/4. Hankel M. **Sableroj.** Poeziaĵoj kaj skizoj. Kun portreto de la altŝatata aŭtorino M. 6.—

Kajero 5/6. Molière: **La malsanulo pro imago.** Komedio en tri aktoj. El franca lingvo tradukita de W. Velten M. 4.—

Kajero 7/8. Zahn Ernst: **Svisaj rakontoj.** El germana lingvo trad. de Ch. Pulvers. Kun portreto de aŭtoro kaj tradukinto M. 4.—

Internacia Mondliteraturo.

La kolekto estas submeita al la gvidado de s-o prof. d-ro Joh. Dietherle, direktoro de la Saksia Esperanto-Instituto Leipzig. Ĝi enhavas nur plej famajn verkojn el ĉiuj naciaj literaturoj kaj valorplenajn Esperanto-originaĵojn. Nur tiuj tradukoj estas publikigitaj, kiujn faris samnacioj de la koncernaj naciaj verkistoj. Volumo I. Goethe J. W. v. **Hermano kaj Doroteo.** El la germana lingvo tradukita de B. Küster. En preparo.

Volumo II-III. Niemojewski A. **Legendoj.** El la pola lingvo tradukita de Br. Kuhl. Kun antaŭparolo de Antoni Grabowski. En Ĥavo: Elsendito. — Tentistoj. — Majloĥ — Gamaljel. — Du disĉiploj. — Dum kveta vespero. — Admono. — Dento pro dento. — En la lasta momento. — Aljudo. — Apud la tombo — Malbenito. Bindite M. 18.—

Volumo IV. Raabe W. **La nigra galero.** Rakonto. El la germana lingvo tradukita de Prof. d-ro Fritz Wicke. Bindite M. 9.—

Fondigis en Varsovio

Esperanta Oficejo,

kiu celas havigi al la Esperanto-societoj necesan Esperantan materialon. Ĝi vendas diversajn librojn, stelojn, poŝtkartojn kaj aliajn objektojn. — La Oficejo nun akiris la sekvantajn librojn de famaj Esp. aŭtoroj, kiel Zamenhof, Grabowski, Kabe ktp.:

La Neĝo.
Mia Liro.
Tri Noveloj.
Consilium Facultatis.
Aŭtunaj Agordoj.
Historiofilozofio de Lingvo Internacia
En Fumelo de Oplo.
Nova Antologio.
Mia Poŝtorlogo.
Al Mokantoj.
Pekoj de l' Infaneco.
La Lastaj Tagoj de D-ro Zamenhof.
Pax.
Sinfono Tadeo.
Antaŭen kun Kredo, kaj multaj aliaj.

Firmo „Renoma“, Varsovio, Pol.
Marszalkowska 91 (posed. M. Klein).

Kiam troviĝos sufiĉaj abonantoj, aperos malgranda revuo

La Mondo Politika.

Jara abonkosto 5/6 ŝil., t. e. 14 resp.-kup. Ne sendu monon tuj, sed anoncu vin kiel abonanto.

Oni invlias artikolojn nepagotajn. Bonvolu enmeti kuponon, se necesos respondo.

Redaktoro,
4 Princeton St., London W. C. 1.

Paŭlo Schiffer, Hungario, Budapest VII, Rozsa u. 27-3-8, deziras korespondi kun ĉiulandanoj.

Francisko Schlotthauer, Hungario, Budapest VIII, Hunyadi u. 58, f. 11, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kun ĉiuj landoj.

Kolomano Balaza, Hungario, Budapest VIII, Hunyadi u. 40, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun ĉiuj landoj.

Stefano Kasza, Hungario, Klásztér II, Szent László utca 7, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun ĉiuj landoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Georgo Pomjan, Hungario, Budapest IX, Dandar utca 24, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun ĉiulandanoj.

S-o Raphael Fernandez, Tarrasa, Hispanio, str. Fuente-Vieja 79, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj; pro troa okupateco estas ofte devigata atendigi skribintojn. Li petas pardonon kaj scligas, ke li tamen nepre respondos al ĉiu.

S-o Kazimierz Domoslowski, kunlaboranto de soc. gazetoj, Warszawa I, poste restante, serĉas ĉiulandajn seriozajn korespondantojn pri laborista, socialista movado kaj ĝenerale pri politika vivo en ĉiu lando. Interŝanĝe sendos samajn informojn el Polio.

Jonui Mikailiunui, Kurŝenu g-ve 13, Ŝiaullai, Litovio deziras korespondi per poŝtkartoj kun ĉiuj landoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

F-lo D-ro M. L. Câmpian, advokato, strato Motilor 4, Cluj, Rumanio, deziras korespondi pretere kun fraŭlinoj el ĉiuj landoj, precipe Finnlando; ĉeestas la XIV-an. (Leteroj, poŝtkartoj ilustr., bildflanke).

F-ino Ilonka Stangel, oficistino, Strada Motilor 135, Cluj, Rumanio, deziras korespondi per leteroj kaj poŝtkartoj ilustr. (bildflanke) kun ĉiuj landoj, precipe Finnlando.

Caŭŝani-Noi (jud. Tighina, Besarabio, Rumanio). — S-o Leib Contarij deziras korespondi kun fotografistoj el ĉiuj landoj kaj pri ĉio kun Azio.

F-ino E. Pliński-Redaite, Siauliai, Mazojl Posadna 4, Litovio, deziras korespondi kun samideanoj de ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kaj papironon.

Soldato H. Baumgartner, 6. Schwadron, Riedenburg, Salzburg, Aŭstrio, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. (bildflanke) kaj poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

Nikolao Ssacharov, Petrograd, Rus., Spasakij pereulok 9, loĝ. 77, deziras korespondi per leteroj, poŝtkartoj kaj poŝtkartoj ilustritaj.

La Interŝanĝo

Franca kaj Esperanta revuo ilustrita por korespondantoj, interŝanĝoj kaj komercaj interrilatoj aperas sep fojojn jare, estas 32- aŭ 40-paĝa, ne enkalkulante la liston de la aliĝantoj sendatan nur al la abonintoj.

Jara abonprezo: 10 francaj frankoj.
Specimena n-o: 1 franca franko aŭ 4 respond.-kuponoj.

A. Bonnefous, Direktoro,
Béziers (Hérault), Francujo,
3, rue du Capus, et 22, rue Viennet.

Nova eksport-objekto! Aparta mur-ornamo!

Mur-bildojn

garantie arte pentritaĵoj per diversaj koloroj sur la interna vitroflanko, laŭ ĉiuj motivoj, en vere bela maniero (grandoj 6:9, 9:12 kaj 15:18 cm) fabrikas kaj eksportas ĉiulanden (ke mirige malaltaj prezoj)

Firmo Emil Jeller, arlaborejo por vitropentrado,
Freiburg i. Br., Germ., Emmendingerstr. 30.

Kapablaj reprezentantoj dezirataj.

Importo. Eksporto.

Pollanda Komerca Agentejo

Adolfo Oberrotman, Varsovio, Krak-Przedm. 10

deziras ligi komercajn rilatojn kun gravaj eksterlandaj firmoj, speciale en teknikaj maŝinoj, manufakturo kaj galanteriaj artikoloj; donas ĉiujn informojn pri la polaj komerclokoj.

Nur pograndaĵoj firmoj bonvolu sendi ofertojn kun specimenoj aŭ katalogo.

Reprezentado. Perado.

Malofta okazo! Malkara vendo!

Por 100 germ. mk., 3 sviz. fk., 3/2 ŝil. aŭ egalvaloro

en naciaj monbiletoj, sendebaj per ĉeko aŭ en rekomendita letero:

100 belajn kolorajn ilustr. poŝtkartojn de hungaraj artpentristoj aŭ

100 reproduktatajn poŝtkartojn de malnovaj pentraĵoj el la budapeŝta Muzeo por Belaj Artoj vi ricevas de

Paŭlo Balkanyi, Budapest VI, Hajos utca 15.

Korespondantoj, atentui!

Mi povas al vi liveri por via interŝanĝo tre malmultekostajn

belajn vizitkartojn kun via fotografajo.

Prezo por 100 kartoj kun bildo kaj nomo 40 gmk. ĉiu plia linio da teksto 2 mk. pli; sendkostoj 6 mk. 100 poŝtkartoj kun via portreto aŭ la bildo (grupejo) 70 mk.; sendkostoj 9 mk.

50 glumarkoj kun via bildo 30 mk.; sendkostoj 4 mk. 100 glumarkoj kun via bildo 40 mk.; sendkostoj 4 mk.

Postulu specimenojn! Skribu la pretekston klare, eble duoble via fotografajo estos resendata sendefekte. Livertempo minimume 4 semajnoj. Alsendo per rekomendita prezo.

... Dankon pro la liveritaj vizitkartoj; ili estas bonaj, belaj, malmultekostaj. — Tao Jung.

La belaj kartetoj tute konstantigis min. Estu certigita, ke mi ne priorilas rekomendi vin. — M. Butin.

Ferna-Versand, Plauen i. Vogtl., Germ.

S-o Jozefo Ŝtulman, Sieradz, Polujo, deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj (bildfl.) ilustritaj kaj leteroj, ankaŭ interŝanĝi. Korespondas volonte Esperante, angle, germane.

S-o Walter L. F. v. d. Have, Krabbenboeweg 135, Hengelo (O), Nederlando, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj leteroj kun la tuta mondo, precipe kun fraŭlinoj; interŝanĝas ankaŭ gazetojn, Esperantaĵojn kaj poŝtmarkojn.

S-o Jose Ventura, 12, Roterod, Valencia, Hispanio, gvidanto de kurso Universitata, deziras korespondi per unu ĉiusepa Esperantaĵo kaj korespondetojn por siaj ĝlernantoj. Li dankos poŝtkarte.

S-o Tiberiu Morariu, klubsekretario, Cluj, Rumanio, Calea Traian 40, deziras korespondi per leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj kun ĝejapanoj. Interŝanĝas Esp. gazetojn, japanajn desegnaĵojn, bildolibretojn, pentraĵojn. Rekomencas laŭdezire ankaŭ per poŝtmarkoj.

S-o Arkadio Kostanov, Astrachani, Katoliĉeskaja 5, Rusio, deziras korespondi pri ĉia temo; interŝanĝas Esp. gazetojn, ĵurnalojn, poŝtmarkojn, ilustr. poŝtkartojn kaj naciajn gazetojn.

S-o Frans A. Qvist, Nordingrad, Sved., deziras korespondi kun samideanoj kaj -inoj el ĉiuj landoj per poŝtkartoj, leteroj ktp. Mi tre volonte peras komercaĵojn.

Budapeŝt. S-o Vilmos Szigetli, V., Nador u. 17-III, Hung., deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-o E. Friebe, instruisto, del. de UEA, Residenzstr. 24, Dresden-Dobriĝ Germanlando, serĉas tutmondajn gekorespondemulojn per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj leteroj pri ĉiu temo, pretere pedagogia; donas komercajn informojn.

35 fervore lernantaj geknaboj (11-13 j.) serĉas samaĝajn gekorespondemulojn. Ilustr. poŝtkartoj al Inŝtr. Friebe, popola lernejo Dresden-Dobriĝ, Germanlando.

Friĝ Kaihe, Magdeburg, Faberstr. 12, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. (bfl.) kaj poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

Kiu sendos al mi 100-200 poŝtmarkojn (escepte ĉeĥoslovakajn), ricevos de mi rekompenca duoblan kvanton da germanaj poŝtmarkoj. Hermann Remers, Düsseldorf, Germ., Louisestr. 97.

S-o Adelberto Geiger, Stuttgart-Gablenberg, Germanio komercisto, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, kostumbildojn papilinojn kaj fotografajojn el ĉiuj landoj.